

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Ekspozicio en galerio urbocentra

Sibayama Zyun'iti

*Foto-Ekspozicio pri Internaciaj Amikecaj Agadoj: la 1-a de majo (mardo) - 7-a de majo (lundo), en Galerio C de Minato-Mirai en la centro de Jokohamo

Nia rondo okazigis jam plurajn fojojn "Foto-Ekspozicio pri Internaciaj Amikecaj Agadoj", t.e. elmonro de niaj fotoj, en kiu ni esperantistoj internacie amikas (ekzemple ĉe UK), plus klarigo, kio estas Esperanto. Tion ni faris ankaŭ ĉi-jare. Kompare al la antaŭaj ekspozicioj en ejo ne multe vizitata de la publiko, ĉi-jara ekspozicio okazis en galerio ĉe komerca koridoro, kiun trapasas multaj homoj aĉetocele aŭ turismocele.

En la 7 tagoj, ni havis entute 492 vizitantojn, inkluzive de kelkaj veteranaj esperantistoj el proksimaj urboj. Aparte menciindaj inter ili estas grupo de polaj turistoj, unu el kiuj estas esperantisto – tiu rimarkas nian ekspozicion pro granda tolaĵo ĉe la fenestro de la ekspoziciejo, kie skribite estis 'Esperanto' en latinaj literoj. Cetere, tiu semajno estas nomata de japanoj kiel "ora semajno", nome enhavis 3 oficialajn feritagojn krom dimanĉo.

La ekspoziciejo estas 80 kvadratmetrojn vasta, kaj ni

aranĝis jenajn ekspoziciaĵojn:

(1) 10 paneloj de fotoj pri internacia amikiĝo en A1-formato + 11 panelojn tiajn en A3-formato: ĉefe per fotoj faritaj de Doi Hirokaz en UK en 2014, 2015 kaj 2016.

(2) 14 paneloj pri la vivo de Zamenhof kaj pri Esperanto en A1-formato: Ilia originalo estis pretigita nome de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj en Pollando en 2017, okaze de la 100-jara jubileo de la morto de L.L.Zamenhof. La originalo havis paralelan tradukon Esperantan-polan, kaj volontuloj de nia grupo faris version kun paralela traduko Esperanto-japana. La paneloj estis ekspoziciataj en la



kun la polaj vizitantoj fotita de s-ro Doi Hirokaz

104-a Japana Esperanto-Kongreso en nia urbo en 2017, kaj post tio konservata en Japana Esperanto-Instituto. De tie ni pruntis kaj aranĝis ekspozicon.

(3) kelkaj paneloj klarigantaj pri Esperanto

(4) kelkaj paneloj en kiuj aperis japanlingvaj gazetartikoloj pri Esperanto

(5) kelkaj aliaj paneloj

(6) libroj de famaj literaturaĵoj tradukitaj en Esperanton: ekzemple "Eta Princo".



Antaŭlerni Portugalion!

*Hama-Ronda Vespero: la 21-an de apr., 17h00-19h30. ĉe la kutima kunvenejo, kunvenis 23.

Ĉi-foja kunveno temis pri Portugalio, la lando de ĉi-jara Universala Kongreso. Niaj rondanoj prelegis, kion ili antaŭlernis pri la lando kaj kulturo portugala.

(1) Pri portugala historio, parolis s-ro Akiya Hideo japanlingve, kun projekciitaj bildoj en Esperanto. Komencinte de prahistoria epoko, li eniris en labirinton de la alveno, milito, konkero de multaj nacioj, de la norda aŭ orienta Eŭropo, de Afriko, koloniigo de Brazilo, ktp.

(2) Pri portugala fervojo, parolis s-ro Namba Fumiharū Esperante. Li, fervoj-amanto, parolis pri la esploritaj aferoj pri metrooj, tramoj en la urbo Lisbono, kaj transnacia trajno portugala-

franca. Li malkaŝis planon mem veturi per ĝi post la UK.

(3) Etan kurson pri la portugala lingvo faris s-ino Miyazaki Hideko. Jen pri alfabeto, personaj pronomoj, ciferoj, salutoj, k.t.p

Aparte interesa al la raportinto de tiu ĉi artikolo estas la du apartaj vorto por nia "estas". Nome, se predikato estas stabila afero kiel nomo, oni uzas 'sou' (por la 1-a persono), sed se predikato estas malstabila afero kiel sanstato, oni uzas 'estou' (por la 1-a persono), k.t.p.

(4) Pri la historio de Esperanto-movado en Portugalio parolis s-ino Doi Ĉieko. Impresis nin historio pri malpermeso de Esperanto.

Kompakta historio de Esperanto-movado en Portugalio

(eltiraĵo el la dokumento de s-ino Doi Ĉieko)
(1887) Esperanto estis publikigita.


1895 La unua esperantisto en Portugalio, verŝajne s-ro Manuel Ribeiro da Costa e Almeida.

1909 La unuaj Esperanto-grupoj en la urboj Porto kaj Lisbono.

(1914-1918) La Unua Mondomilito, en kiu Portugalio venkis.

1916 Esperanto estis permesata de la Promilita Centro.

1926- Subpremo al Esperanto en la diktatoreca reĝimo.



- 1936 Subite ĉiuj Esperanto-societoj estis police fermitaj.
- (1939-1945) La Dua Mondomilito, kiu ne tuŝis Portugalion.
- 1941-1948 Denove funkciis Esperanto-movado.
- 1948 La malpermeso de Esperanto estis renovigita.
- 1951 La portugala Landa Asocio restarigita, sed ties statuto ne estis akceptita.
- 1959 Aperis "Antologio de Portugalaj Rakontoj" libroforme.
- 1967 Mildigis la situacio kontraŭ Esperanto.
- 1972 Fondigis Portugala Esperanto-Asocio.
- 1983 En Sintro okazis Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
- 2018 En Lisbono okazos la 103-a Universala Kongreso.



Niaj Planoj

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

***maj. 19 [KK] Hama-Ronda Vespero:**

japanlingva prelego de socimovadisto, s-ro Nomoto Sankichi, simpatianto de nia lingvo. Li parolos kion li atendas de Esperanto.

***jun. 2 [KK] Legokunsido:**

Leginte jenan libron, oni kunsidos por impresoj, kritikoj pri la libro: "Gvidlibro pri Jokohamo kun Eseoj Hamalogiaj", eldonita de ni en la lasta jaro.

***jun. 16 [KK] Hama-Ronda Vespero:**

esperantlingva prelego s-ino Phuon Bui Thi (karesnome Midori), vjetnama studentino studanta en Japanio. Ŝi parolos pri diversaj aferoj pri Vjetnamio, venontjara Azia Kongreso de Esperanto en Danang, Vjetnamio, ŝia impresoj pri Japanio, ktp.

Nia gazeto voĉlegita de 3ZZZ

3ZZZ estas la komputila radiostacio aŭstralio, kiu elsendas en Esperanto. En tiu ĉi jaro ĝis nun, 3 artikoloj el tiu ĉi gazeto estis voĉlegitaj kaj komentitaj de la radioparolistoj.

(1) la 29a de januaro 2018: el Novaĵoj Tamtamas N° 333 "Koncerto de virina korusgrupo "Graceful singers"" de Murata Kazuyo.

(2) la 30a de aprilo 2018: el Novaĵoj Tamtamas n° 336 "Tri mini-montoj "Fujizuka" en Norda Jokohamo" de Akiya Hideo.

(3) la 7a de majo 2018: el Novaĵoj Tamtamas n° 336, "Pri la historio de lerneja manĝaĵo" de Seguchi Yuko.

Ili estas aŭskulteblaj de melburno.org.au/3ZZZradio/.



Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

***Fundamentaj Kursoj en sabato**

(1) de la 17a de feb. ĝis la 28a de apr., gvidate de Fuse Kentaro. Eklernis 2 personoj kaj finlernis 1 persono.

(2) de la 12a de majo ĝis la 21a de jul., gvidate de Doi Ĉieko. Eklernis 1 persono.

***Regulaj Klasoj en sabato**

(1) Klaso Eseoj, por legi "Tamen ĝi moviĝas!" gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas "Mondo de travivaĵoj", 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado laŭ sia plaĉa fonto

***Regulaj Klasoj en merkredo**

(1) Klaso Belĉielo, por legi "Punkuino", gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso Belflora, por legi "Punkuino", gvidate de Doi Ĉieko

(3) Klaso eriko, por legi "La Zamenhof-Strato" gvidate de Doi Ĉieko

Beletro

Songô

verkis AKUTAGAŬA Rjunosuke
tradukis AIDA Yayoi

Laŭ onidiro estas prave, ke homoj havas kolorigitan songon kiam ili suferas pro nervoza malsano. Sed mi havis kolorajn songojn delonge kiam mi estis knabo. Ne, mi ne povas preskaŭ kredi senkolorajn songojn. Antaŭ kelkaj tagoj mi renkontis en mia songo poeton H.K. ĉe la marbanejo, kaj tiam li portis pajlo-ĉapelon kaj malhelan belmantelon. Admirante la koloron mi demandis lin, “Kia koloro ĝi nomiĝas?” La poeto rigardis sablon kaj respondis tre simple — “Tiu ĉi koloro? Ĝi estas Sapporo-koloro.”

Ankaŭ onidire absolute ne aperas flarsento en songo. Sed mi memoras malbonan odoron bruligi gumon aŭ ion tian en mia songo. Tio okazis kiam mi estis paŝanta en vespera ĉirkaŭurbo, kie videblis rivero. Kaj en la rivero naĝis senkaŭze multe da grandaj krokodiloj kiel lignoj. Mi pensis marŝante en la urbo, ke “Ĉi tiu eble estas enirejo en la Suezan Kanalon”. Verdire tiama songo pri flarsento estis en mia sperto la unua kaj lasta.

Laste mi mencias pri la songo koncerne al miaj utaoj aŭ hajkoj. Bedaŭrinde mi ne sukcese elfaris

eĉ minimume plenumitan version, kompreneble el mi tute ne naskiĝis majstraj versoj. Kaj tamen en mia songo mi kredis, ke miaj banalaj versoj ne estas tiel malbonaj. Mi estis survoje en la kamparo same kiel antaŭ kelkaj tagoj. Tie ripozis multaj kamparaj viroj kaj virinoj, kaj tien trairis unu malgranda sankta palankeno portite per kuraĝigaj kriegoj. Rigardante tian scenon mi elfaris hajkon kaj memfieris pri tio grandege. Poste kiam mi rememoris ĝin, mi estis frakasita de la hajko, ĉar ĝi estis tia —

Vidante sanktan palankenon portita
Staras mi sur piedpintoj



sankta palankeno

Ĉu songo havas koloron? odoron?

La supra traduko estas eseo de Akutagaŭa Rjunosuke, fama japana novelisto, verkita en 1926. La traduko estis prezentita en la lasta februaro en la lernoklaso de “Salonoj” en nia rondo, en kiu ĉiun kvaran sabaton membroj alportas sian tradukaĵon kaj interkritikas pri la verko.

Okaze de tiu ĉi traduko, estis jena diskuto: ĉu oni songas songon kun koloro, aŭ kun odoro? La aŭtoro de la eseo jesas pri ambaŭ. Sed inter ni estis iuj, kiuj neis pri koloro, kaj iuj, kiuj jesis. Mi jesis, ĉar mi iam songis ke mi flugas kvazaŭ birdo sur verda kampo. Pri odoro multaj neis.

(Sibayama Zyun'iti)

Mia songo ĉiam havas koloron. Kiam mi ankoraŭ laboris, en mia songo aperis mia superulo, kiu tiam enhospitaliĝis pro pulma kancero. En songo li venis en la laborejon apogate ambaŭflanke de kolegoj, kaj falis. Tiam en la songo li portis helverdan ĉemizon. Mi neniam vidis lin kun helverda vestaĵo, kiu ne bone sidas al li. Ĝi estis tre stranga songo, kaj post nelonge mi sciis lian morton.

(Sibayama Noriko)

Karaj legantoj!

Skribu vian sperton aŭ impreson pri via songo, precipe kun koloro kaj odoro!